


BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



BULGARA ESPERANTISTO

ENHAVO

monata revuo, organiza, kultura,
socia, literatura, lingva.

Adreso: Bulgario, Sofio, bul. Dondu-
kov 57, tel. 7-46-01.

Ĉefredaktoro: **Violin Oljanov**

Redakta komitato: **Ivan Sarafov,**
Stefka Ĥristova, Stefan Kiraĝiev,
Stefan Maserov, Simeon Simeo-
nov

Abonpago: jara — 14 levoj, duon-
jara — 7, unuopa n-ro — 1,40;
por eksterlando — 16 levoj, 1,5
dolaroj aŭ egalvaloro jare.

Reklamoj. Ekstera kovrilpaĝo: tuta
— 1000 levoj, duono — 500, kva-
rono — 280. Interna: tuta — 900,
duono — 450, kvarono — 250. Ko-
respondanoncoj — 0.5 levo por vor-
to; eksterlandaj adresoj — sen-
page.

PERANTOJ DE «BULGARA ESPERANTISTO»

Albanio: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga
Stafa, Tiranë.

Koreo: Korea Esperanto-Asocio
Pjeng' jang, P. O. kesto 16.

Sovetunio: J. Kudrjavickij, PK 1255
Moskva K-9.

Nederlando: Ru Bossong, Flora-
plein 23, Eindhoven.

Rumanio: Mihail Popescu, Cal. 13
Septembrie 65, Bucuresti 5.

Ĥr. Gorov. La plej grava ĉenero (ĉefartikolo)	1
Monto-domo «Esperanto»	2
Organiza vivo (G. Nedelĉev, T. Gocev — Dimitrovgrad, B. Kavalĝiev — Ruse)	5
II-a Junulara balo	5
Al XV-a sesio de la ĝenerala asambleo de UNO	6
T. Oŝanski. Unu agrabla horo	6
V. Oljanov. Gaste al la Itala Esperanto-Kongreso	7
Tra la mondo	9
V. Oljanov. La dolomitoj (ver- saĵo)	10
P. Torsen. Versaĵoj	10
Dora Gabe. Nigramara kanto (versaĵo)	11
D. Metodiev. Ŝanhaj (versaĵo)	11
D. Freto. Por la atoma milito (versaĵo)	11
B. Szeremi. Nuntempa Bulgario	12
G. Zaletov. Ankoraŭ pri la neo- logismoj	16

LA REDAKCIO akceptas ma-
terialojn por la koncerna nu-
mero de «Bulgara esperantisto»
ĝis la 12-a de la antaŭa mona-
to. Nur kiel escepto gravaj ak-
tualaj materialoj estos akcepta-
taj ĝis la 25-a de la antaŭa mo-
nato.

La aŭtoroj estas petataj skri-
bi tre klare, kun granda inter-
linia spaco kaj margeno. Manu-
skriptoj ne estas resendataj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

LA PLEJ GRAVA ĈENERO

Nia brila 34-a kongreso decidis atentigi pli serioze al stabiligo kaj firmigo de la organiza stato de nia enlanda Esperanto movado. Tio ebligis se niaj societoj en urboj kaj vilaĝoj agos laŭ la maksimumo: aktiva homo neniam restas senokupa. Gravan signifon por aktivigi la geesperantistojn havas la jarkunvenoj, kiuj okazos en januaro kaj februaro de la nova 1961 jaro.

Kiu estos la plej grava momento en ĉiu jarkunveno? Necesas kompreneble prepari analizan raporton, plani la estontan agadon laŭ la postuloj de la kongresa rezolucio, tamen la ĉefa afero estas elekti laborkapablan estraron, konsistantan el malnovaj kaj novaj geesperantistoj, kiuj estos iniciatemaj kaj ne bezonas injekton de la centro por ĉiu societa ago. Bedaŭrinde ankoraŭ ekzistas societoj, kiuj vegetas pro manko de iniciatkapablo. Ekzistas societoj kun multenombra anaro, kies organiza kaj kultura vivo pulsas dank' al unu-du personoj; ili skizas planon por agado, ili kunvokas la tradiciajn kunvenojn, ili gvidas kursojn. En simila streĉa laboro eĉ la nelacigebla propagandisto elĉerpas siajn fortojn kaj la rezultato estas mal-kontentiga. Jen pro kio estas necese zorgeme elekti la novajn estraranojn. Ili devas esti homoj, kiuj ŝatas labori por nia afero kaj kiuj estas fidelaj al la idealoj, por kiuj suferis kaj viktimiĝis multaj esperantistoj en la batalo kontraŭ la faŝismo. En la estraroj de la societoj devas eniri geesperantistoj, kiuj ne nur persone aplikas la lingvon, sed vidas en ĝi rimedon por reciproka interamikiĝo, por konservo de la paco kaj por konigi al la cetera mondo la sukcesojn en la ekonomia kaj kultura vivo de nia socialisma lando.

Tre grava paŝo de l' novaj estraroj estos la ellaboro de l' plano, kiu ampleksas la antaŭstarantajn taskojn. La efektiva nombro de la esperantistoj en nia lando estas multe pli granda ol tiu de la enskribitaj en la societoj, do ni devas varbi senĉese por fortikigi BEA. Nia gazeto «Bulgara Esperantisto» aperas regule. Ĝia enhavo fariĝas ĉiam pli interesa, sed la nombro de la abonantoj estas malgranda. Ni devas serĉi urĝe novajn abonantojn. La kotizo en la societoj ne estas alta, sed ankaŭ ĝi ne estas regule kolektata. La supraj taskoj povas esti plenumataj nur se oni agas laŭplane.

Plane devas funkcii ankaŭ la kulturkleriga agado. Ne estas sekreto, ke iuj geesperantistoj subtaksas la idean edukadon kaj staras flanke de

I' vojo, kiun sekvas la tuta popolo. La vintra sezono estas tre favora por prelegoj je diversaj temoj, kaj devo de ĉiu nova estraro estos energie konduki ĉi aferon.

Nur kiel altkleraj inspiritaj adeptoj de la scienca socialismo ni povas bone organizi la internacian korespondadon kaj pruvi al niaj konatoj kaj amikoj en eksterlando, ke nia popolo alte ŝatas pacon kaj sindone laboras por la prospero de sia lando. La internacia korespondado estas tre grava tasko kaj la lokaj societoj solvos ĝin per la fortoj de ĉiuj siaj membroj.

Tiuj estas la ĉefaj taskoj, kiuj staras antaŭ la novaj estraroj de la lokaj societoj. Efektive sufiĉe da taskoj atendas nin, tamen ni solvos ilin agante kolektive. Tio postulas de ni serioze kaj profunde pripensi la demandojn kaj decidi konkrete.

La laboro de la estraro devas esti dividita inter ĉiuj estraranoj. Unu devas respondi pri la propagando, alia — pri la internacia korespondado, tria — pri la organizaj aferoj, kvara — pri la kaso kaj abonoj ktp. Kiam mankas memkonscio tiam devas helpi la kamaradeca kritiko.

Do, la elekto de taŭga estraro estas tiu plej grava ĉenero, kiun ni devas kapti por eltiri la tutan ĉenon — por solvi la demandojn, kiujn starigis antaŭ ni la 34-a kongreso de nia asocio.

Al laboro!


ORGANIZA vivo

MONTO-DOMO «ESPERANTO»

Antaŭ unu jaro kaj duono la Plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio decidis ke la esperantistoj enverŝu siajn fortojn per sia karakteriza entuziasmo en la tutpopolan movadon por akcelita plenumo de la kvinjara plano. Ĉu ja eblas alimaniere? Ja la esperantistoj estis en la unuaj vicoj de la batalo kontraŭ la faŝismo, kiom da iliaj vivoj forbrulis en tiu batalo. La aktivaj esperantistoj Ĥristo Kârpaĉev, Vela Peeva, Stojko Kalpazanov, Stojan Edrev estiĝis naciaj herooj. Nun ili inspiras la novan generacion de adeptoj kaj propagandistoj de la internacia lingvo en la konstruo de la nova socio, de la nova vivo. Kaj en ĉiu esperantisto ekflamis la ambicio, ke oni

estu modelo tie, kie laboras aŭ loĝas kaj per tio plialtigu la aŭtoritaton de la bulgara esperantista movado. Ĉu tio ne estas la plej bona propagando por la internacia lingvo, por nia movado? Ne, ni ne estas sekto, ni ne staras flanke de nia popolo, de ĝia batalo, de la vivo.

Sed ĉu tio sufiĉas? En multaj lokoj la esperantistaj societoj deziras montriĝi kiel kolektivo, ĉiamigi sian nomon. Kaj jen, en urbo Pazarĝik oni fondis brigadon «Esperanto», kiu riparis la lernejon. Pri tio skribis la ĵurnalo «Uĉitelsko delo». En Polski Trâmbeŝ oni okupis sin per ornamo de unu parto de la parko, en vilaĝo Rozino la esperantistoj donis la iniciaton por tutpopola «festo de la ro-



zoj». Kaj la lernantoj-esperantistoj de la gimnazio en vilaĝo Polski Trąbce (Tárnova distrikto) fondis ĝelernantan agrikulturan kooperativon «Esperanto». Per sia abnegacia laboro ili montras valoran helpon al siaj gepatroj kaj pli aĝaj fratoj, al la tuta nacia ekonomio.

Kaj Sofio? Ja ĝi estas centro, est-raro, tie ĉi devas naskiĝi la imitinda ekzemplo. Kaj ĝi naskiĝis. La ĉefur-ba konsilantaro klopodas plibeligi la amatan de ĉiuj sofianoj monton Vi-toŝa. Kial ni ne helpu? Kaj sofia so-cieto «Maksim Gorkij» petis la admi-nistrejon de la entrepreno «Arbaraj parkoj» disponigi al ĝi unu belan parton, kiu estos nomata «Esperanto». Tie la esperantistoj metos ben-kojn, plantos arbojn, konstruos belan fontanon. Ĉu ni sukcesos plenumi nian promeson? En ĉiu ago estas an-kaŭ skeptikuloj. Sed jen la loko estas elektita. 1350 metrojn supermara ni-velo survoje al montodomoj «Sredec» kaj «Kamen djal». Kaj kian panora-mon malkovras la rigardo! Antaŭe etendiĝas la sofia glata ebenaĵo kun nia belega ĉefurbo. Norde baras la vidvastajon la senfina ĉeno de la le-gendeca Balkanmontaro, maldekstre kuntiriĝas «la dormema» Ljulin kaj

kontraŭ ĝi, ne malproksime de ni, es-tas sidiĝinta sur la vertikala mont-pinto «Kopitoto» la nova hotelo-res-toracio de «Balkanturist». Kiel bele estus, se oni tie ĉi konstruos monto-domon! Kaj tiu kuraĝa penso konke-ras kelkajn entuziasmojn. Ĝi rapide plivastiĝas kaj eniras la korojn...

La klubejo estas plenplena. La ar-kitekto Ĉilov etendas sur la nigra ta-bulo la planon de la estonta monto-domo «Esperanto». Jen tie ĉi estos la kuirejo, la antaŭĉambro, la akcepte-jo. Ŝrankoj en la muroj. Rigardo al Balkanturist. Kaj je la fasado vasta teraso malkovros por la amantoj de la pejzaĝo la mirindan panoramon al Sofio. «La konsilantaro donos la ma-terialojn, de vi oni postulas la labo-ron», finis la arkitekto.

Tuj anoncis sin 20 volontuloj por laboro en la objekto.

Kaj jen venis dimanĉo. La tagiĝo ekridetis super la ĉefurbo. Tio estis unu el tiuj belaj aŭtunaj tagoj, kiam la mirindaj koloroj de la arbaro ra-vas la rigardon kaj la varmaj sunaj radioj karesas la vizaĝon. Ĉu la lo-gaĵo de tiu belega aŭtuna tago aŭ la subite ŝprucinta entuziasmo aŭ am-baŭ tiuj faktoroj faris la miraklon. En la bela vitoŝa loko «Esperanto»

de ĉiuj flankoj amasiĝis pli ol 100 personoj. La instrumentoj ne sufiĉas, sed la manoj kaj la entuziasmo kompletigos ilin. Kaj la pioĉoj, la ŝoveliloj, la veturiloj funkcias. Grupo da gelernantoj de la teknika lernejo por kaŭcuko kaj plastoj ordigas la brikojn, alia junulara grupo amasigas ŝtonojn por la konstruaĵo. La komuna celo kaj la idealismo kunvenigis tien ĉi homojn de plej diversaj aĝoj, profesioj, kompreno. La lernantino Violeta Bojilova montriĝas per sia bona laboro. Unu post alia ŝi veturigas la veturilojn kaj elŝutas la teraĵon. La laciĝo cedis lokon al la entuziasmo. Sed ŝi kompatas la maljunan laboriston Meleŝko Ŝiŝkov. Li aĝas



anstataŭis per tute praktika laboro. La studentoj kolektiĝis en unu grupon kaj deziras esti unuaj.

Sed... la trankvila aŭtuna tago finiĝas. Ne malmulte da laboro estas finita. La elfosaĵoj jam desegnas la estontan turistan domon. Viglaj kantoj eĥas en la monto.

Kaj jen jam ĉiutage po kelkaj personoj donas sian laborforton por la komuna afero. La verda flago kun la stelo flirtas super la objekto. La multnombraj turistoj trapasantaj survoje scias: tie ĉi oni konstruas montodomon «Esperanto». Kaj kiam post unu aŭ du jaroj, kara leganto, vi vizitos Sofion, ni invitos vin al nia montodomo por enspiri la revivigan montaran aeron kaj por ke vin konsternu la mirinda vespera panoramo de lumradianta Sofio.



68 jarojn, sed ne postrestas de la junuloj. La ŝovelilo lerte turniĝas en liaj manoj. Violeta proponas, ke oni anstataŭu lin. Sed Meleŝko protestas, ofendiĝas. Ĉu por tio li kuŝis en la faŝistaj malliberejoj, ĉu por tio li renkontis fiera kaj nevenkebla la mortkondamnon. Li deziras kune kun la junuloj konstrui la novon, pri kio li kuraĝe batalis. Doktoro Todorov dum la ripozoj kolektas junulojn por lerni la esperantajn kantojn. La profesoro de la Universitato Genov senvestita, nuda ĝis la lumbo levas alten la pioĉon. Ĥodiaŭ la filozofiajn diskutojn li



V. O.

PROMESO-ALVOKO

de la Esperanto-societo «Flamo» en uzino «Stalin» — Dimitrovgrad, por konkurado kun ĉiuj societoj en la lando dum la tempo inter la 34-a kaj 35-a kongreso de BEA:

La membroj de la E-societo «Flamo» promesas:

aktive partopreni en la iniciatoj de la Partio, Komsomolo kaj la Sindikatoj;

malfermi propran klubon kun la necesaj mebloj, biblioteko, magnetofono kaj skribmaŝino;

plialtigi la membraron de la societo al 100 membroj por 1961 j. kaj 150 por 1962 j.;

kolekti regule la membrokotizon;

malfermi regule ĉiujare kursojn por komencantoj kaj progresintoj, estante tiucele en kontakta ligo kun la uzina sindikata komitato kaj la komsomola komitato;

organizi aĉetadon de esperanta literaturo por la uzina biblioteko;

aranĝi propagandajn vitrokestojn en la uzino mem kaj en la proksimaj urbopartoj;

aranĝi kaj konstante zorgi por la esperanta angulo en la uzino;

organizi junularan grupon ĉe la societo;

organizi renkontojn por interŝanĝo de sperto kun la aliaj societoj (Ĥaskovo k.a.);

aboni la organon de BEA «Bulgara Esperantisto» centprocente;

eldoni Zamenhofan-folion okaze de lia datreveno;

organizi gvidadon de la Esperanto-parolantaj eksterlandaj vizitantoj de la uzino;

sendi reprezentantojn de la societo en la esperantistajn tendarojn;

esti modelaj laboristoj kaj oficistoj en la uzino.

La Promeso- Alvoko estis akceptita unuanime en societa kunveno.

Prezidanto: (s) G. Nedelĉev

Sekretario: (s) T. Gocev

Gesamideanoj, precipe el la uzinaj societoj, ĉu vi sekvas la ekzemplon de la dimitrovgradaj esperantistoj?

Ruse. La loka societo «Libero» aranĝis la 16-an de oktobro solenaĵon pri la komenco de la nova lernjaro.

En la salono de Komsomolo kunvenis malnovaj esperantistoj, gejunuloj kaj novaj gekursanoj el ĉiuj mezlernejoj de la urbo — pli ol 200 personoj.

Ĝin malfermis la prezidanto de la Junulara Sekcio s-ano Ivan Ljuckanov kaj post sia mallonga salutparolo donis la parolon al la studento Momĉo Momĉev, kiu en bone argumentita raporto klarigis la neceson de internacia helplingvo por la homaro, ĝian kreon kaj la ĝisnunan evoluon dum pli ol 70-jara

ekzistado. Li dankis pri la intereso al Esperanto kaj invitis la novajn gekursanojn sukcese lerni la plej facilan lingvon en la mondo per kiu ili gajnas geamikojn el ĉiuj landoj al kiuj skribos pri la sukcesoj de la nova vivo en nia lando kaj pri nia Esperanto-movado.

Sekvis la paroloj de la prezidanto de la societo s-ano Dobri Kolarov kaj la centra komitatano Maria Preslavska kiuj same per konvenaj vortoj salutis kaj bondeziris seriozan lernadon al la komencantoj.

Tre agrable surprizis la solenaĵon la pionira grupo de lernejo «Angel Kânĉev», kiu jam vizitas kurson gvidatan de s-ano Kalinov kaj per florbukedoj salutis la kunvenon, post kio prezentis sian literaturan programon.

La ĉeestantaj malnovaj esperantistoj estis kortuŝitaj pro la entuziasmo de la juna generacio.

Boris Kavalĝiev

LA DUA JUNULARA BALO

Tiuj el ni, kiuj dum la unuaj tagoj de la kuranta jaro entreprenis longan vojaĝon ĝis la marbordo por ĉeesti la unuan junularan balon kaj konferencon en Burgas, poste ne bedaŭris pri tio. La partoprenintoj ĝuis du belegajn tagojn en bonhumora esperantista medio.

Estas por ni granda plezuro anonci ke ĉijare la balon mastros niaj plovdivaj geamikoj. Ili proponas eĉ pli allogajn kondiĉojn — urbo pli facile atingebla, enloĝado certigita, vespermanĝo, programo, ludoj, dancoj kaj konkursoj ĝis frua mateno en la plej altgrada restoracio «Trimoncium», dumtaga ekskurso tra la vindindaĵoj de la urbo. La balo okazos la 4-an de februaro 1961 kaj la konferenco — la 5-an antaŭtagmeze.

Gekamaradoj, ne hezitu, sed tuĵ aliĝu al la sola dumvintra tutlanda esperantista aranĝo sendante nur 25 lv. (inkluzive enirtakson, manĝon kaj noktumon) per poŝtmandato al konto 15/1878 ĉe DSK — Distrikta filio Plovdiv. Per frua aliĝo ni faciligas la laboron de la organiza komitato.

Detalajn informojn oni petu je adreso: Plovdiv, p. k. 151 — Esperanto-societo «Kulturo» — Junulara Grupo.

Venu amase en Plovdiv!

Al XV sesio de la Ĝenerala Asambleo UNO

New Jork

Kopio: N. S. Hruščov

Kopio: Todor Ĵivkov

La Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio salutas la XV-an sesion de la Ĝenerala Kunveno de UNO kaj deziras fruktodonan laboron. La bulgaraj esperantistoj kiel ĉiuj esperantistoj en la mondo batalas por eterna paco kaj interfratiĝo de la popoloj. Jen pro kio ni ekĝojegis eksciinte la proponojn de la soveta delegitaro pri ĝenerala senarmigo, pri nuligo de la hontinda koloniismo kaj kreo de amikaj ekonomiaj kulturaj kaj komercaj rilatoj inter la popoloj.

Por tiuj altaj idealoj sopiras la tuta homaro, por ili la esperantistoj batalas abnegacie.

Centra Komitato de BEA

UNU AGRABLA HORO

Belega estas la urbeto Belogradĉik, situanta meze de la pitoreskaj, mondkonataj rokoj (de Belogradĉik).

En la pasinteco ĉi tie floris vigla Esperanto-movado. Nun la novaj gesamideanoj fondis la societon «EĤO DE LA ROKOJ».

En posttagmeza maja tago, sur la placo de la urbeto mi rimarkis aŭtobuson. El fenestreto flirtis flageto kun nia amata verda stelo!

Meze de tiu ĉi grupo da gelernantoj kun gaja humoro la instruisto pretigis ilian forveturon. Sur la refaldo de lia palto briletis verdstela insigno.

— Nu, bonan venon, kara samideano! Emociite mi etendis al li mian manon.

— Ha! — li ekmiris — esperantisto? Samideano? En ĉi tiu urbeto? Lernantoj, jen vera surprizo!

Ni varme interparolis, sentante nin kvazaŭ delonge intimaj konatuloj. Ankaŭ aliaj lernantoj proksimiĝis. Evidentiĝis, ke inter ili troviĝas ankoraŭ kelkaj esperantistoj.

Laŭtvoĉe la instruisto Penĉo Petrov, gvidanto de la geekskursantoj el urbo Plovdiv, anoncis:

— Honore, al nia amiko, ni prokrastu la forveturon unu horon. Nu, bonvolu, ni grupe promenadu!

Trapasinte la placon, la loĝantaro aŭskultis kun intereso nian belsonan Esperanton, neordinaran por ili.

Kun entuziasmo ni ekmarŝis laŭ la aleoj de la natura parko. Ĉiuj ni sentis la bezonon paroli... paroli!!

Mi volonte montris al ili la interesajn rokarojn. Antaŭ la okuloj vastiĝis belegaj vidindaĵoj. Abundis la sorĉaj formoj de la rokoj. Kies lerta mano kapablis skulpti tiujn ĉi miraklojn: neimageblaj kasteloj, gigantaj bestoj kaj eĉ delikata virina figureto — junulino revanta!

Longe la rokoj eĉe redonis la sonorplenajn esperantajn vortojn.

Nerimarkite venis la tempo de l' adiaŭado. La gastoj okupis lokojn en

GASTE AL LA ITALA ESPERANTO-KONGRESO

(Kortina d' Ampeco, 10-16. IX. 1960)

Tuj post la transveturo de la limo min salutis freŝa kaj ridetanta la golfo de Triesto. Per la farboj de granda artisto, orumita de la okcidentaj sunradioj, tiu konsterna rando de la terglobo alnajlas la rigardon, paralizas la konscion. Forlogita de tiu mirinda panoramo oni ne sentas kiam la vagonaro eniras la peronon kaj haltas. En la koridoro mi renkontis anglan samideanon kun kiu, ne sciante, ni veturis en unu vagono. Li konsilis min resti por noktumo en Triesto. Nin renkontis triesta samideano, kiu dum la vespero montris al ni la vidindaĵojn de la urbo. Feliĉe estis kunventago kaj ni povis vespere renkontiĝi kun la lokaj gesamideanoj. La klubo — sufiĉe komforta — entenis dekon da junaj kaj maljunaj gesamideanoj. Programo ne estis. Simpla renkontiĝo kaj konversacio.

La sekvintan matenon kun la triesta grupo ni ekveturis al Kortina d' Ampeco. La serene ridetanta tago favoris al la bona humoro kaj pligis la ĉarmon de la norditala montara naturo. La vagonaro grimpas sur la fortika korpo de la Alpoj. Ĉiam alten! Unu post alia ŝanĝiĝas majestaj vidaĵoj, neripetebaj montoformoj, kapturnaj rokegoj impetantaj kiel gotiko de katolikaj templegoj al la ĉielo. Je la 14 h. ni alvenis en la kongresurbon Kortina d' Ampeco (Cortina d'Ampezzo). La natura ĉirkaŭaĵo konsternas la rigardon. La rokaj gigantoj de la Dolomitoj abrupte levas

sian monstran staturon kaj traboras per siaj pintoj la grizan ĉielon. Eĉ la malsolena renkonto fare de LKK ne povis rompi la fortan impreson de tiu malofta vidaĵo. Simple dirite, ĉe la stacidomo neniu nin renkontis. Pli ĝuste unu triestanino renkontis siajn samurbanojn kaj kondukis ilin al la antaŭokupita hotelo. Al ni, mi kaj la angla s-ano ŝi proponis atendi ĉe la stacidomo (kial tie?) ĝis kiam oni malfermos la kongresan akceptejon kaj foriris kun sia grupo. Tiun neĝojigan perspektivon ni renkontis ne aparte entuziasme kaj prenis la iniciaton en niajn manojn. Ni jam komencis kutimiĝi je tiaj malfavoraj cirkonstancoj kaj precipe la angla s-ano, kiu portante multajn pakaĵojn, vane atendis helpon de la kunvojaĝanta triesta grupo ĉe la kelkaj transvagoniĝoj. Do ni trovis hotelon kaj post refreŝiĝo ni direktis nin al la akceptejo, kie afable renkontitaj ricevis la kongresdokumentojn kaj estiĝis regulaj kongresanoj. Tie ni eksciis, ke fakte LKK konsistas nur el unu homo, vere tre agema, sed unu sola samideano kaj do la mankoj estas pardonindaj. Sed kial oni organizas kongreson en lokoj kie ne ekzistas forta societo, aŭ ĉu oni ne povis en antaŭkongresaj tagoj plifortigi LKK-on per aktivuloj el proksimaj lokoj?

La interkona vespero okazis sufiĉe modeste en unu kafejo. Io aparte notinda ne estis.

la aŭtobuson. Ĝi flue ekveturis laŭ la blanka ŝoseo... Multaj amikaj manoj svinge salutas. Aŭdiĝas voĉoj:

— Ĝis revido, kara amiko!!!

Malaperis jam la flageto...

Denove provinca trankvilo. Denove mi restis sola. Nur en mia animo vivas la rememoro:

«Agrabla, neforgesebla horo...!»

Todor Oŝanski

La oficiala malfermo okazis dimanĉe, la 11-an de septembro, en la komunuma halo. Ĉeestis ĉirkaŭ 300 personoj. Malfermis ĝin la prezidanto de LKK Karlo Agustino kiu transdonis la parolon al la prezidanto de FEI Prof. Canuto. Salutis la kongreson 9 eksterlandaj esperantistoj (Aŭstrio, Bulgario, Francio, Finnlando, Jugoslavio, Germanio, Svislando, Britlando). La bulgara delegito Violin Oljanov en sia salutparolo substrekiis la historiajn amikajn rilatojn inter la bulgara kaj la itala popoloj kaj la komunajn trajtojn de ties his-



torioj kaj precipe en la batalo kontraŭ la faŝismo. Kelkaj italaj jurnaloj notis lian paroladon. Li transdonis donace al FEI kaj LKK esperantajn librojn eldonitajn en Bulgario. La kongreso estis salutita ankaŭ de la urbestro.

Post la malferma solenaĵo la kongresanoj direktiĝis al la stadiono kie okazis komuna fotografiĝo kaj gajiga aperitivo.

Posttagmeze komenciĝis la labora parto de la kongreso. En tri kunsidoj estis pridiskutita la agado de la federacio. Specialan atenton ĝuis la problemoj pri lernolibroj kaj vortaroj, pri Esperanto-instruistoj, pri plimultigo de la membraro. Juna esperantistino el Milano proponis kaj estis akceptite, ke FEI eldonu cirkuleron pri organizo de gejunularaj grupoj,

ke el ĉiu societo oni sendu ankaŭ junulojn al la kongreso kaj eĉ oni pagu al ili la vojaĝelspezojn.

Karakterizaj por la itala kongreso estis la amuzaj aranĝoj, kiuj laŭ amplekso superis la laboran parton. Ĥoro de Kortina koncertis per popularaj kantoj. Tre sukcesa estis ankaŭ la koncerto de la ljubljana esperantista ĥoro.

La kongresa balo okazis en la salonego de la luksa hotelo «Kristalo». Tie oni anoncis la rezultojn de la belarta konkurso. Unuan premion gajnis la bulgara reprezentanto. (La premiitan versaĵon «Dolomitoj» ni publikigas aparte en tiu ĉi kajero). La duan premion gajnis itala esperantisto kaj la trian — francino. La balo pasis en ĝoja kaj kamaradeca atmosfero.

Rava estis la veturado per ŝnurovojo. Ĝi malkovris la tutan majestcon de tiu ĉi Alpa rando. La manoj instinkte enpremas la kadron de la veturseĝo kiam ĝi ŝvebas super la abrupto de la starantaj rokegoj.

Agrablan amuzon prezentis al la kongresanoj la dancado sur glacio kiu okazis en la stadiono.

Tre bela estis ankaŭ la duontaga ekskurso al Lago di Misurina. La fortaj impresoj de la ĉarma Alpa naturo estis kronitaj de la agrabla satiĝo de riĉa bankedo.

Sed... ĉio kio komenciĝis devas ankaŭ fini. Ni devis kun bedaŭro forlasi tiun benitan randon de la terglobo. La kongresaranĝo havis bonajn flankojn kaj mankojn. Sed kvankam ne estis montrita tiel entuziasma akcepto kaj intereso al ni, la eksterlandaj gastoj, kiel okazas en nia lando (eble unu el la kaŭzoj estas la tre amasa vizitado de Italio fare de fremdlandanoj) ni fartis bone dum la kongresaj tagoj kaj vesperoj. Estis iuj interesaj elementoj en la tuta aranĝo. Iujn el ili ni povas konsideri kaj utiligi ĉe la organizo de niaj kon-

greso. Grandan atenton la italaj samideanoj direktis al la propaganda enhavo de la kongreso. Antaŭ la malfermo okazis gazetara konferenco. Preskaŭ ĉiuvespere estis aranĝitaj itallingvaj paroladoj pri diversaj problemoj de la internacia lingvo.

La konkursoj vekas grandan intereson kaj instigas al verkado. Ili estas aplikindaj ankaŭ de ni, se ne dum la kongresoj, almenaŭ dum junularaj renkontiĝoj, konferencoj k.s. La kongresa insigno estis tre simpla sed sufiĉe bela kaj impona kaj la kongresanoj volonte ĝin portis.

Post la kongreso mi faris vojaĝon

tra Italio, vizitante Venecion, Romon, Napoli, Firenze, Bolonjon kaj Pado-von. Interesaj kaj variaj estas la impresoj, sed ja tio estas alia temo kaj la spaco ne sufiĉas. Ĉie mi estis renkontata afable kaj komplezeme (kun escepto de Firenze, kie la fakdelegito pri turismo f-ino B. Brogioni rifuzis eĉ renkontiĝi kun mi). Dankon al la italaj samideanoj kiuj helpis al mi ĝui la belaĵojn de ilia lando. XXXI Itala Esperanto-Kongreso en la rava urbeto Cortina d' Ampeco lasos agrablajn rememorojn ĉe mi.

Violin Oljanov

TRA LA MONDO

Dum la lernojaro 1959-1960 en Francio okazis regulaj kursoj de Esperanto en 12 instruist(in)aj seminarioj. Ĉirkaŭ 200 lernantoj, estontaj geinstruistoj, vizitis la kursojn, kiuj estis iuloke devigaj kaj aliloke — nedevigaj.

*

En la kanada universitato Mc Master, en Hamiltono, Ontario, oni la unuan fojon organizis kurson de Esperanto. La kurson gvidos la vicprezidantino de la Kanada Esperanto-Asocio s-ino Vilma Eichholz.

*

La Pola Esperanto-Asocio eldonis lastatempe gramofondiskon (longdaŭran) kun 6 kantoj. Mendebla ĉe Pola Esperanto-Asocio kontraŭ zl. 36.

*

Dank' al la klopodoj de danaj esperantistoj, la Dana Ministerio de la instruado asignis al la Centra Dana Esperantista Ligo 5,000 kronojn kiel helpon por eldoni danan antologion en Esperanto.

6-a SKIFERIO EN FLIZMOOS — AŬSTRIO

La 6-a Skiferio okazos ree en Pensiono «Reithof», kiu situas kvaronhoro super v. Filmoos, Aŭstrio. Ĝin atingos veturante per la trajno al Eben im Pongraŭ.

La Skiferio okazos de la 26-a de decembro 1960 ĝis la 8-a de januaro

1961 kaj kostas po persono 680 aŭstr. ŝilingoj. Aliĝilon kaj antaŭpagon sendu al s-ro Hainrich Reiter, Wien XII, Altmannsdorferstrasse 90/1. Petu pliajn informojn kaj prospekton sendante respondkuponon.

Violin Oljanov

LA DOLOMITOJ*

En lukto impeta kun grizaj tavoloj
ekmordas per dentoj traboraj ĉielon,
ĉi tie postenas por paca laboro
de l' hom' sopiranta beatan Edenon
fieraj, majestaj, en glor' Dolomitoj,
de granda, genia artisto skulptitaj.

La sonĝoj bildantaj en frua junaĝo
akceptis en miaj okuloj realon:
mi kuras sen lac' en senfina vastaĵo
libere ĝuante, kun ardo, kun amo,
fierajn, majestajn,

en glor' Dolomitojn,
abunde de l' Majstro-Naturo dotitajn.

Aŭdacaj rokegoj,
tranĉantaj la nubojn,
mirindaj figuroj — mistera ornamo,
bukedo da verda pinar' en la subo...
Mi pensas kaj serĉas sekretan kialon:
fieraj, majestaj en glor' Dolomitoj,
pro kio, de kiu vi estas benitaj?

Vi staru, kapturnaj, potencaj
gigantoj —
jen froste severaj, jen ride salutaj, —
inspiru la homon feliĉon serĉantan
celadi sentime, batale la supron!
Vi staru kapturnaj,

en pac' Dolomitoj,
en sonĝa, miraĝa nebul' vualitaj!

Kortina d'Ampeco, 14.X.1960

* Tiu ĉi versaĵo ricevis unuan premion en la belarta konkurso dum la XXXI-a Itala Esperanto-Kongreso en Kortina d'Ampeco (10-16. IX. 1960.)

Paul Thorsen

NIGRAJ MANOJ

Bonvolu noti por eterna forgeso
ĉefrajton de kavaliroj de l' preso:
papere kaj inke
mensogi konvinke.

ĈU HONTE

Laŭdire el ĉiuj estuloj
sole la Homo sporade ruĝiĝas.
Laŭ subjektivaj kalkuloj
sole por homoj la kaŭzoj sufiĉas.

INTERNACIA JURO

La internacia juro
estas sistem' de sekuro,
kies validoj tuj ĉesas,
kiam apliko necesas.

DU SLOGANOJ

L'atoma bombo:
la homa tombo.
L'alternativo:
paca kunvivo.

AFRIKO

La trakto en novaj landoj
al blankaj, pli fruaj regantoj
laŭ plene egalaj reguloj
estas pli ol meritas blankuloj.

ALTAJ IDEALOJ

Kun mano sur sanktaj tabuloj
liberon, progreson ni ĵuras,
sed antaŭ la tagaj postuloj
pretekstas, ke l' temp' ne maturas.

SUBITA DUBO

Ĉu poeto
aŭ nura rimisto?
Ĉu soneto
aŭ pura vortlisto?

NIGRAMARA KANTO

Staras mi ĉe l' mara bordo
 en proksimo de Balĉik,
 kie ventoj sin renkontas,
 mevoj krozas super dig'.
 Plenŝarĝitaj vaporŝipoj
 la havenon lasas for
 de la vento ekpelitaj
 fajras akre la vapor'.
 Ho vi maro, Nigra Maro,
 kial ondas vi sen fin',
 furiozas dum tutjaro?
 Certe iu vundis vin?
 Iunokte rabis oni
 ses junhomojn por kondamn',
 inter ili vi rekonis
 eĉ patrinon kun infan'.
 For de l' bordo en boato
 oni pafis kuglojn ses,
 kaj la maro ses kadavrojn
 kovris per la akvopez'.
 Ond' post ond' atakas bordon,
 ŝprucas akvo ĉe la dig',
 brilas luno el la nordo —
 de l' sesop' nenia sign'.

El la bulgara: Ĥrima

Diberto Freto

FOR LA ATOMA MILITO

Lacaj de jarmilaj militoj,
 lacaj de stultaj superstiĉoj,
 lacaj de religiaj mitoj,
 lacaj de sociaj fetiĉoj,
 volas pacon ĉiuj teranoj,
 por la vivo de la infanoj.
 La krima milito atoma
 atencas kontraŭ vivo homa.
 La krimo kontraŭ Ĥiroŝima
 pasis trans la terura limo
 de la tuta homa kruelo:
 Homoj! Al paco kun fidelito!
 Homoj! Ne buĉu fratojn viajn!

ŜANĤAJ

La 7-an de novembro
 1957 j.

Mi iris sur balkonon,
 vekita de kantado.
 Hellumis firmamento
 simile al ruĝflago.

Tra vasta horizonto
 sternas sin urbego, kaj
 surstrate jen jubilas
 popolo de ŜanĤaj.

Mi kiel batalanto
 aliĝas al la ĥor':
 «... kaj la internacio
 triumfu en la mond'...»

Oferus mi la vivon
 en kiu ajn aŭtun',
 se aŭdus mi ĉi himnon
 kantatan sub la sun'
 de iu granda urbo —
 en Romo aŭ Parizo
 aŭ eĉ en Vaŝington.

El bulgara: Ĥrima

Ne uzu atombombojn fiajn!
 Uzu la atomenergion
 por feliĉo de nia Tero.
 Faru solan teran nacion,
 kaj homoj vivu en libero.
 Ni klopodu, ke la atomoj
 laboru pace por la homoj.
 Se ni ne laboras por tio,
 mortos la civilizacio.
 La estonto de la homaro
 ne devas esti sanga maro.
 Pace ni uzu la atomojn,
 aŭ ili detruos la homojn.

Laŭ la invito de la gvidantaro de BEA, la prezidantaro de Hungara Esperanto-Konsilantaro, delegis min al la 34-a Landa Esperanto-Kongreso.

Paŝante sur la teron de Bulgario, kaptis min ia neesprimebla emocio. Tiu ĉi emocio ne forlasis min dum mia ĉeesto en la amika lando. La frateca akcepto en la ejo de BEA faris grandan impreson al mi. Inter la ĉeestantaj gekamaradoj mi konis persone eble nur du, tamen la rideto sur la lipoj, la brilo en la okuloj, la manoj etenditaj por manpremo esprimis la sentojn de la koro, pruvante, ke mi estas en kara, frateca rondo.

En la hotelo, kie la personaro ne scipovas Esperanton, same mi spertis ne nur ĝentilecon, sed afablan, amikan sintenon.

Nur tri urbojn mi vizitis, kaj nur parton mi vidis el ili, tamen neniam mi povas forgesi ilin.

TARNOVO. Belega, malnova ĉefurbo de Bulgario. La pitoreska situo de la urbo — mi pensas — estas unika en la mondo. La montaro, sur kies deklivo la domoj staras ŝtuparmaniere unu super la alia, ŝajnas giganto, kiun la homo venkis kaj devigas teni sur sia dorso la nestojn de homaj familioj. La rivero, fluanta tra la urbo, faras la panoramon ankoraŭ pli bela.

Sed en tiuj ĉi tagoj Târnovo estas pli bela ol kutime. Ĝi estas feste ornamita, kiel fianĉino dum sia geedziĝfestoj. Larĝaj, verdaj rubandoj, standardoj flirtas sur la ĉefaj stratoj kaj sur la granda placo. Salutvortoj, sloganoj renkontas la gastojn, inter kiuj estas multaj eksterlandanoj. Gaja babilado, rido eĥas en la aero de frumateno ĝis nokto. Jes, esceptokaze granda fremda trafiko estis tiam en Târnovo. BEA aranĝis sian 34-an Landan Esperantan Kongreson

kaj ĉi tie renkontiĝis bulgaraj kaj eksterlandaj geamikoj, gekamaradoj batalantoj por paco, parolantaj en la sama lingvo.

La tritagaj laborkunsidoj respegulis la seriozecon de la esperanta movado en Bulgario. Dum la entuziasma malferma kaj ferma festenoj en la Somera Teatro, evidentiĝis, ke la ĉeestantoj alproprigis la internan ideon de Esperanto.

VARNA. Vojaĝante al urbo Varna ni paroladis kune: bulgara, hungara, ĉeĥoslovaka, nederlanda, dana, rumana, pola esperantistoj, pri la neforgeseblaj tagoj de la kongreso.

Alveninte en la marbordan urbon, jam en la unua momento ni konstatis, ke tie estis multaj fremdlandanoj kaj ke la urbo estas ŝatata somerumejo. La stratoj estas buntaj pro la flirtantaj, multkoloraj someraj vestaĵoj. Ne nur la suno, sed ankaŭ la vizaĝoj de la homoj radias pro afableco. Rideto sur la lipoj, ĝojflametoj en la okuloj montris, ke la homoj estas feliĉaj ĉi tie kaj ĝuas la pacon, la belecon de la ĉirkaŭaĵo, kien ili veturis el diversaj partoj de Eŭropo por pasiĝi ĉi tie la ferion. La urbo mem estas bela, moderna. La Ora strando kun siaj modernaj hoteloj, ripozejoj, sanatorioj prezentas altnivelan kulturlokon, luksan ripozlokon. Larĝe etendiĝas la horizonto super la Nigra Maro, kies ondoj ŝaŭme galopas ai la sabla bordo, de kie la petolaj gejunuloj sin ĵetas al ili, kvazaŭ por kapti, aŭ bridi ilin.

En SOFIO mi denove trovis multajn alilandanojn, sed promenante sur la strato oni ne povas diferencii ĉu eksterlandanoj, ĉu bulgaroj ili estas? Ĉu riĉaj kapitalist-landaj turistoj, ĉu socialist-landaj gastoj ili estas? Ĉiuj estas bone, eĉ elegante vestitaj. La virinoj estas bele, laŭmode vestitaj, la infanoj estas ĉarmaj, la

viroj ĝentilaj, helpopretaj. La vendejoj — ĉu de nutraĵo, ĉu de alispecaj varoj — estas riĉe prizorgataj. La granda universala magazeno estas eleganta, moderna vendejo plenplena de varoj, de la pinglo ĝis la televidaparato kaj aŭtomobilo, — ĉio estas aĉetebla en ĝi.

En la ĉefurbo mia unua vojo kondukis al la maŭzoleo de la genia gvidanto, heroo filo de la bulgara popolo. Eĉ la plej elokventa parolo estas malriĉa esprimo kompare al la sentoj, kiuj superŝutis min, pilgrimante ĉirkaŭ lia silenta, mortmorta korpo, sed eterne vivanta nomo...

Promenante en la ĉefurbo, pririgardante monumentojn, konstruaĵojn, mi povas diri, ke mi ekkonis kaj ekkomprenis la bulgaran popolon.

La gvidantaro eternigis en bronzo, en ŝtonon la plej belajn paĝojn de la bulgara historio.

Foje mi legis, ke la sentoj de la homa koro estas altigeblaj ĝis ne esprimeblaj skaloj. Pri tio ekmemoris mi, starante antaŭ la monumento de la Soveta Armeo. Mi ekflamiĝis pro entuziasmo. Ŝajnis al mi, ke la skulptistoj formis la monumenton ne el bronzo, sed el siaj koroj kaj animoj. Sur la plej supra parto de la statusoklo staras la statuo de la soveta soldato etendante sian dekstran manon, kun aŭtomata pafilo en ĝi, alten, al la ĉielo. Maldekstre de ĝi — iom pli malalte — figuro de bulgara partizano, dekstre staras juna, bulgara patrino tenante sur sia brako sian infanon — la bulgaran estonton.

La du monument-grupoj, — 20-25 metrojn antaŭ la ĉefa monumento — elokvente prezentas la partoprenon de la bulgara popolo en la batalo por la liberiĝo kaj en la konstruo de la socialismo en Bulgario.

La amo kaj la estimo plenigantaj la koron de la bulgara popolo, al la liberigantoj kaj al la bulgaraj herooj,

estas esprimata en la monumento de la bulgaraj herooj mortintaj en la batalo kontraŭ la germanaj faŝistoj. La fundamento de la statuo estas eble 25 metrojn longa kaj 2-3 metrojn alta marmora muro. Meze leviĝas (eble) 25 metrojn alta obelisko. Antaŭ ĝi bronza statuo de juna partizanparo, starante fiere kaj kuraĝe kun armilo, kaj malsignante adiaŭon, — aŭ eble salutsignas de malproksime la gekamaradojn.

Dekstre de la centra figuro, en la marmora muro multfigura bronza reliefo eternigas la momenton, kiam la ribeluloj de la jaro 1923 — transdonas la kaŝe konservitan ruĝan flagon al la partizanoj ekirontaj por batalo kontraŭ la germanaj faŝistoj en la jaro 1941. Ankaŭ maldekstre de la centra figuro estas bronza reliefo, kiu eternigas la renkontiĝon de la bulgaraj partizanoj kun la soveta armeo.

La monumento de la Rusa-Liberiginto estas ne nur artverko, sed pri la historio de la bulgara popolo elokvente parolanta arta kreaĵo.

Post la trarigardo de tiu ĉi monumento al mi estiĝis klare, ke la fundamento de Nuntempa Bulgario estis kreata jam antaŭ kelkcent jaroj, dum kiuj la bulgara popolo verŝis sangon kaj kuraĝe batalis por sia patrolando, por sia libereco. La amika kaj frateca najbaro — la rusa popolo, helpis disrompi la ĉenon de subpremantoj, kiuj sufokis heroan Bulgarian.

Mi neniam forgesas kaj ofte pensas pri Bulgario. Ofte mi rememoras la heroan popolon de Bulgario, miajn karajn gefratojn, geamikojn esperantistajn. Dankon al vi por la invito, por tio, ke vi ebligis al mi ekkoni almenaŭ parton de via lando, parton de bulgara animo kaj spirito. Per tiu ĉi ekkono mi fariĝis pli riĉa — anime.

Borbala Szeremi-Toth

ANKORAŬ PRI LA NEOLOGISMOJ

En la NN 4 kaj 6 de «Bulgara Esperantisto» aperis artikolo pri neologismoj «Ĉu Esperanto bezonas novajn vortojn?», verkita de evidente konvinkita adepto de neologisma riĉigado de Esperanto.

La artikolo de Maserov laŭ siaj argumentoj, rezonadoj kaj eĉ citaĵoj estas tute simila al aliaj tiuspecaj artikoloj, kiuj lastatempe aperis en sufiĉe granda kvanto. Ilia karakteriza trajto estas la rilato al Esperanto ne kiel al disvolvita, vivanta lingvo, meritanta estimon kaj konsiderojn ne malpli ol ĉiu nacia lingvo, sed kiel al artefarita lingvoprojekto, en kiu apartaj personoj rajtas fari ŝanĝojn laŭ sia plaĉo kaj laŭ sia logiko. En la artikolo eĉ estas proponita programo, laŭ kiu tiaj ŝanĝoj devas esti farataj (la sep «principoj» de neologismofarado de Kalocsay).

Kiajn do motivojn prezentas la aŭtoro de la artikolo por enkondukado de neologismoj? Unu el ili — la nesufiĉa logikeco de malnovaj vortoj. La vorto **preĝejo** prave devas esti anstataŭigita per la neologisma «kerko», ĉar laŭ la logiko ĝi devas signifi ĉian ejon por preĝi, sed ne nur la kristanan. Tiel asertas la aŭtoro. Nu, se li dirus al iu simplanima esperantisto, ke iu turko aŭ hebreo venis en la preĝejon por preĝi, ĉu ne sekvas la tute natura demando: «Ĉu tiu turko kristaniĝis?». En la vivo de la lingvo la tradicio kaj la kutimoj ofte havas pli grandan forton, ol la pura logiko, kaj la vorton **preĝejo** la esperantistoj ĉiam komprenis kiel kristanan preĝejon, sed ne kiel ĝeneralan nomon por ĉiuj ejoj, kie oni preĝas. Mi ne scias, kian signifon donas al tiu vorto samideano Atanasov en siaj novaj vortaroj, sed en la Esperanta-Rusa vortaro de Zamenhof ĝi estas tradukita per **cerkovj** kaj en la Esperanta-Germana vortaro de Jürgensen (fakte redaktita de Zamenhof) — per **Kirche**, do laŭ Zamenhof ĝi estis **kristana ejo por preĝi**.

Tion saman oni povas diri pri aliaj samspecaj vortoj: **pafilo** (kiun la logikemuloj penas anstataŭigi per la franca «fusilo», lasante al ĝi) al la pafilo (nur la tute necesan por la lingvo signifon de ĉia ilo, servanta por pafado, **arbaro** (forsto, silvo), **ventego** (tempesto) k. t. p. Nur la vorto **homaro** ial restis ĝis nun ekster la neologismaj atencoj de la logikemuloj, kvankam laŭ ilia logiko ankaŭ ĝi devas signifi ĉian aron

de homoj, sed ne speciale tiun, kiun ni ordinare signas per tiu vorto. Ĉiuj ĉi tiuj neologismoj estas ne nur nenecesaj, sed eĉ malutilaj, ĉar ili kondukas al senvalorigo de la plej genia eltrovaĵo de Zamenhof — lia sistemo de sufiksoj kaj prefiksoj — kaj ŝanĝas la tutan naturon de Esperanto.

Alia kategorio de neologismoj, por kiu la artikolo ankaŭ insiste pledas, estas la «fakvortoj» de la belarta literaturo. Esperanta radikaro ne sufiĉas por altvalora belarta verkado. Por akiri literaturan «taŭgecon» Esperanto devas enpreni novajn vortojn kaj novajn esprimformojn «por transdoni ne nur la nudan penson, sed ankaŭ la delikatajn nuancojn, metaforajn vortaplikojn kaj duonklarajn aludojn. Nur tiele kreiĝas vere bel-literatura lingvo Esperanto». Per tiaj belaj vortoj s-ano Maserov volas konvinki la legantojn pri neceseco de la «belartaj» neologismoj. El lia diro devas sekvi, ke la malnova Zamenhofa Esperanto ne estis taŭga por belliteratura verkado, kaj nur la moderna neologisma skolo ĝin faris tia! Mi tamen en simpleco de mia animo ne tre komprenas, per kio ekzemple **hida** el la poezia vidpunkto estas pli preferinda ol la malnova **abomena**, **prizono** — **malliberejo** aŭ **karcero**, **stupida** — ol **stulta**, **meretrico** — ol **publikulino** ktp.

Ĉu la lingvoj de la modernaj nacioj fariĝis tiel riĉaj kaj esprimovaj per tio, ke ili enprenis en sin multe da fremdaj vortoj? Ĉu la grandaj verkistoj naciaj, eĉ tiuj, kiuj estis la fondintoj de la literaturaj lingvoj, scipovis eltrovi rimedojn por la plej delikata, figureca kaj adekvata vortigado de siaj pensoj kaj poeziaj trasentaĵoj, nur servante sin per francaj kaj latinaj vortoj? Ne, ili estas grandaj pro tio, ke ili kreis tiujn rimedojn el la materialo, trovita de ili interne de ilia propra lingvo, disvolvante kaj eluzante la eblojn, kiujn posedis tiuj lingvoj en latentaj stato.

La aŭtoro de la artikolo konigas al ni, ke eminenta mondverkisto en naciaj literaturoj bezonas por sia verkado ne malpli ol 10,000 radikvortojn. Mi ne volas disputi kontraŭ la cifero*, tamen oni ne devas forgesi, ke naciaj lingvoj ne posedas tiel perfektan kaj racian sistemon de vortfarado, kian havas Esperanto, kaj ofte ideoj, sence ligitaj inter si, estas en ili esprimataj per vortoj de malsamaj radikoj. Sendube en Esperanto tiu cifero povas esti grandparte malpliigita.

* En sia verko «Retoriko» Ivo Laponna donas ciferojn aliajn. Laŭ liaj fontoj ĉirkaŭ 10,000 vortoj estas la tuta (ne nur radika) vortprovizo de verkisto kiel Milton. Ŝekspir uzis 15,000 vortojn (ankaŭ ne nur radikojn). Kaj nur la verkaro de Viktor Hugo estas skribita per 20,000 vortoj, kio tamen estas dubinda (Retoriko, pĝ. 80).

Tion pruvas la ekzemplo de Zamenhof mem, kiu scipovis tute egalvalore traduki en Esperanton la plej malfacile tradukeblajn verkojn de naciaj literaturoj, disponante vortprovizon (radikan) multe malpli grandan, ol la supre indikitan.

Oni diras, ke la enprenado de fremdaj vortoj estas afero tute natura, ke en ĝi esprimiĝas la normala vivo kaj disvolviĝo de la lingvo, kaj kiu batalas kontraŭ la neologismoj, tiu rifuzas al Esperanto la rajton nomiĝi vivanta lingvo. Belaj vortoj, tamen nur vortoj. En la «vivantaj» lingvoj la neologismoj naskiĝas laŭ maniero tute alia, ol kiel oni volas ilin naski en Esperanto. Tie novaj vortoj aperas spontanee, ordinaraj unue en la parolata lingvo de la popolo, nur poste penetrante en la literaturan lingvon, kaj ili kreiĝas plej ofte el elementoj de la propra lingvo, nur uzataj kaj kombinitaj laŭ nova maniero. La tradicio kaj la lingva rutino ĉiam kontraŭstaras al la novaĵoj, kaj oni devas esti tre rekonita literatura majstro por permesi al si enkonduki ion novan.

Komparu kun tio la manieron de neologismofarado en Esperanto. Estas kreata teorio, laŭ kiu la belarta literaturo bezonas aliajn vortojn, ol kiujn uzas la ordinara lingvo, la vortoj kun la prefikso **mal** estas nefolereblaj, la kunmetaĵoj estas maloportunaj. Konforme al tiu teorio estas kunmetata listo da «belartaj» vortoj, arbitre ĉerpataj el la franca lingvo, kaj tiuj vortoj estas proponataj al la «lingvokulturantoj» kiel «fakvortoj» de la poezio, sen kiuj ne estas ebla altkvalita originala kreado, nek «konkero» de naciaj ĉefverkoj. Ĉiu aŭtoro, ĉiu poeto, kiu ne volas esti kvalifikita kiel sen-gusta primitivulo, devas nepre ekuzi ilin en siaj verkoj anstataŭ la malnovaj samsencaj zamenhofaj vortoj. Tiel, laŭ opinio de kelkaj, efektiviĝas la vera evoluado de Esperanto kiel «vivanta» lingvo!

Objektive pensante, oni devas en tio vidi nur penadon arbitre reformi la lingvon, farante ĝin pli agrabla por la okuloj de poliglota estetikuloj, sed samtempe malmulte komprenebla por la esperantista demokrataro. La lasta cirkonstanco malmulte zorgigos la korifeojn de la neologisma skolo. Laŭ ili la literaturo devas servi nur por liveri plezuron al areto da «litteraturemaj» esperantistoj, kaj la ordinara esperantistoj devas kontentiĝi per sia korespondo pri malnovaj temoj aŭ per facilaj klubaj babiladoj,

por kio sufiĉas la «vulgara» (tiel en la artikolo de Maserov!) senneologisma Esperanto. Ĉu oni povas imagi pli antidemokratian opinion pri la rolo de la Esperanta literaturo? Kiel en ĉiu lingvo, la literaturo Esperanta devas servi al la popolo, edukadi ĝin, instigi al penado por pli alta lingva sperteco, inspiri amon al la bela lingvo Zamenhofa. Kiel povas plenumi tiujn taskojn literaturo, kiu parolas kun la homoj en nekonata por ili lingvo kaj per nekompreneblaj vortoj? La ordinara esperantistoj tute ne estas malkleraj homoj, kaj sian nacian literaturon ili sendube legas. Se ili ne legas la literaturon Esperantan, tio estas klarigebla nur per tio, ke ĝi estas verkata en lingvo alia, ol kiun ili lernis en siaj kursoj kaj en siaj lernolibroj.

Nun pri la statistiko. Tre ŝatata argumento de la neologistoj, per kiu ili defendas sian rajton enkonduki novajn vortojn, estas la ekzemplo de Zamenhof. Ili diras, ke Zamenhof mem uzadis tre multajn neologismojn kaj per tio kvazaŭ rajtigis ankaŭ aliajn esperantistojn tion fari. Samideano Maserov skribas pri 1294 neoficialaj vortoj, kiujn uzis Zamenhof en siaj verkoj. La cifero estas granda, kaj unuavide povas ŝajni, ke prava estas prof. Waringhien, proklaminta en sia libro «Lingvo kaj vivo» Zamenhof-on «la plej granda neologisto en Esperanto». Tamen tiu argumento tuj perdas tre grandan parton de sia forto, se oni konsideros ne la kvanton, sed la kvaliton de tiuj vortoj. Ne ĉiuj neoficialaj vortoj ja povas esti nomitaj neologismoj. Ĉu al neologismoj povas esti alkalkulitaj ekzemple jenaj neoficialaj vortoj, uzitaj iam de Zamenhof: **aberracio, aerostato, akustiko, antagonismo, arsenalo, betono, dividendo, ekspedicio, filatelio, faraono, hibrido, koalicio, metalurgio, postulato, renegato, stereotipo, trajektorio ktp?** Ĉiuj tiaj vortoj apartenas al Esperanto laŭ la 15-a paragrafo de la Fundamenta Gramatiko, kaj ilia uzado povas elvoki nenies protestojn. Sed similaj vortoj iaras pli ol 80% de tiu terura nombro 1294! Fakte nur ĉirkaŭ 200 veraj neologismoj povas esti enkulpiĝitaj al Zamenhof*, kaj en tiu nombro estas diversaj specialaj vortoj (nomoj de plantoj kaj bestoj, terminoj medicinaj, natursciencaj, teknikaj, gramatikaj, vortoj ekleziaj kaj bibliaj kaj similaj), kiujn Zamenhof certe ne povis krei el lingveroj pure esperantaj, sed nepre devis preni el latina, franca aŭ aliaj lingvoj aŭ el la fakaj terminaroj. Do

* Tiun ĉi aserton oni povas facile kontroli, se oni trarigardos ĉiujn vortojn en la Plena Vortaro kun la signo (z), presitajn kun malgranda komenclitero (aldoninte ankaŭ tiujn, kiuj estis oficialigitaj post lia morto).

la disfamigita «neologisteco» de Zamenhof devas aperi antaŭ ni kiel nura mito kaj ne povas servi por pravigi la neologisman manieron de la modernaj neologismemuloj. Oni devas diri, ke ankaŭ la zamenhofajn neologismojn la esperantistoj ne ĉiam aprobis. Iufoje ili renkontis tre akran kritikon. Sed finfine Zamenhof estis Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo, kaj oni povis al li permesi tion, kio ne estas permesebla al aliaj.

Zamenhof ankaŭ alimaniere estas ofte altirata por pravigi la emon al neologisma «perfektigado» de la lingvo. Tion oni faras per citado de liaj eldiroj, kaj ne ĉiam tiuj citadoj estas honestaj. Tiel, ankaŭ la citaĵo, kiun ni legas en la artikolo de Maserov, estas ne tute ĝusta kaj alisencigas la penson de Zamenhof. Ĝi estas tirita el la fama letero de Zamenhof al kapitano Capé (1904)*, kiun la neologismemuloj ĉiam tiel volonte klopodas serviĝi por siaj celoj. Per tiu letero Zamenhof penas pravigi sin antaŭ la esperantistaro okaze de publikigo de la aprobitaj de li germanaj vortaroj kun multaj por tiu tempo novaj vortoj. Skribante pri la neologismoj, «ke ili devas garantii kontraŭ la Babilona konfuzo, kiu aperus, se ĉiuj aparte kreus vortojn malegalajn» Zamenhof evidente havis en la penso nur la novajn vortojn de tiuj vortaroj, sed ne la neologismojn ĝenerale, ĉar li ankaŭ aldonas: **«Malbonaj aŭtoroj trouzos la uzadon de tiaj vortoj, sed sen ili (komprenu: sen la novaj vortoj, proponitaj en tiuj vortaroj) la malbonaj aŭtoroj ankoraŭ pli multe difektus la lingvon.** La senco estas tute alia, ol kiun volas sugesti la citaĵo de la artikolo. Oni devas tion kompreni nur tiel, ke per siaj neologismoj (kiuj tiam, en 1904, estis necesaj por la infanaĝa ankoraŭ lingvo) Zamenhof celis antaŭgardi la lingvon kontraŭ ĥaosa kaj senbrida neologisma «kreado» de «malbonaj aŭtoroj», ĉar li evidente timis, ke la donita de li lingva libero povas tamen sekviĝi gravajn danĝerojn por Esperanto, se ĝi estos

malbone uzata. La historio de Esperanto, post lia morto pravas, ke tiuj timoj estis en granda mezuro pravaj.

Kian do normalan pozicion oni povas okupi rilate la neologisman problemon? La neologismoj ekzistas en ĉiu vivanta lingvo, tial ankaŭ Esperanto povas ilin havi. Sed aperi en la Internacia Lingvo ili devas laŭ la sama maniero, laŭ kiu ili aperas en lingvoj naciaj. Neniu protestos kontraŭ nova vorto, servanta por esprimi novan ideon aŭ nomi novan objekton, aperantajn en la vivo; neniu protestos kontraŭ la specialaj sciencaj, teknikaj, fakaj vortoj, per kiuj plaĉas al la fakuloj kompreniĝi inter si, kiam ankaŭ kelkaj el tiuj vortoj penetras en la komunan lingvon; neniu protestos kontraŭ la vortoj internaciaj, kiuj estas egalsence uzataj en ĉiuj modernaj lingvoj, se eĉ iuj el ili en Esperanto estas neoficialaj. Sed ĉiu amanta sian lingvon esperantisto rajtas esprimi sian proteston kaj sian abomenon por la vortoj, kontraŭnature enpuŝataj en la lingvon kun la celo forpeli malnovajn, por ĉiuj familiaĵoj, fundamentajn vortojn kaj per tio ŝanĝi la fizionomion kaj eĉ la naturon de nia lingvo. Konklude mi permesas al mi miaflanke citi kelkajn liniojn el tiu sama letero de Zamenhof al Capé: «Neniu en la mondo, nek la aŭtoro de Esperanto, nek iu alia esperantisto havas la rajton fari en tiuj (temas pri la fundamentaj vortoj de Esperanto) ian ŝanĝon. Se ekzemple anstataŭ «ŝipo» iu uzus la vorton «havo», ĉar la vorto «ŝipo» al li «ne plaĉas» — tio estus rekta peko kontraŭ la unueco de nia lingvo, kaj ĉiuj esperantistoj tiam protestos». Kaj kiom da fundamentaj vortoj estis simile anstataŭigitaj per barbaraĵoj de la modernaj amantoj de lingva eksperimento!

Anstataŭ la sep principoj de Kalocsay mi volus proponi nur unu, sekvindan por la lingvokulturantoj: **«Ne faru en Esperanton, kion vi ne permesus al vi fari en via nacia lingvo.»**

G. Zaletov

Rostovo-Sur-Dono, Sovetio

* Vidu ĝin en la «Originala Verkaro de Zamenhof», paĝoj 428-430.

Baldaŭ aperos „Elektitaj versaĵoj de Nikola Vapcarov en traduko de Esperanto

DEZIRAS KORESRONDI

VIETNAMIO

Phan Long, profesoro 23-jara, 30 Hoi Vu, Hanoi — kun ĉl; interŝ. E-librojn, insignojn.
Trinh-Chong (Dao-Ngoc-Bich), 37 Cot-co, Hanoi — kun ĉl pri ĉt.

ĈEHOSLOVAKIO

Karel Zikmund, Nizkov 13, Ĉeĥoslovakio — kun ĉl pri ĉt.

Jaroslav Kosik, Detenice 104, kun ĉl.

Adames Jan, Moskevskà 147, K. Vary, ĈSR — 28-jara fraŭlo petas kontakton kun scia esperantisto aŭ esp-ino.

RUMANIO

Crâncău — Ioan, V. Alexandrii 48, Baia-Mare, Rumanio — 31-jara esperantisto, kun geesperantistoj. Interŝ. BK.

Julio Bor, studento, 23-jara, str. Marinescu 23, Cluj, Rumanio — kun ĉl pri kino, literaturo, arto ktp.

Ing. Theodoro N. Mateescu, str. Crișan 6, Caransebeș — interŝ. PM nur kun filatelistoj el ĉl.

JUGOSLAVIO

Milka Maravič, lernantino 15-jara, vojislav Mišića 1, Jugoslavio, kun ĉl pri muziko, filmo.

POLLANDO

Rena Tomaszewska, Osiedle Ogródowe, Blok 16/22, Nova Huta, Pollando, kun ĉl.

Grajina Dziubek, studentino, Osiedle «B2», Blok 50, m. 3, Nova Huta, Pollando — kun ĉl pri ĉt.

Erich Klotz, Scheffelstrasse 35, (22-a) Düsseldorf 10, Germanio, dez. kor, tutmonde per Pl.

Edward Piskorski, Piekary Sl., ul. Buczka nr. 50-szk, nr. 4, Pollando — kun ĉl pri ĉt.

USSR

Anja Kissina, str. Komjaunimo 9-12, Vilnius, Litovio, USSR — kun ĉl pri ĉt.

Stilgys Rimas, studento de teknika instituto, 19-jara, Viduno 25, Kaunas 5, Litovio, USSR — kun gejunuloj el ĉl, interŝ. PM, Pl, IL.

Lubomir Sobanski, Hmelnicka obl. Dunaĵevskij r., Minkovci. Kun ĉl pri ĉt.

Heinriĥ Puško, P. Stučkas 38-16, Riga 11, Latvio — 27-jara kuracisto, pri medicino, arto, muziko, baleto kaj kino.

50 kursanoj kaj ties kursgvidanto de E (16-50-jaraj) — kun Bulgario kaj malproksimaj landoj pri ĉt. Adreso: A. Mikk, Aia str. 12, Abja-Paluoja, Estona SSR.

K-do Jakov Vlasov, ul. Fevral'skaja 133, Ŝadrinsk, Kurganskoj obl., Sovet-Unio serĉas siajn malnovajn korespondantojn Nedelko Lazarov Dimitrov el urbo Popovo, kun kiu li korespondis en 1927, kaj Angel Spasov el vilaĝo Rajkovo, kun kiu li korespondis en 1933.

NEDERLANDO

Klaas Limbrug, Utrecht, Malieŝtrato 11, Nederlando. Kun ĉl.

U S A

La ĝenerala sekretario de la Internacia Klubo Kolektanta Esperantajn serĉas korespondantojn, kiuj afrankas siajn leterojn per esp. PM. Li respondas per BK afrankitaj per usonaj aŭ unuigantaj PM. Interŝ. esp. glumarkojn kaj stampojn. Li serĉas la stampojn: Vizitu la 33-an Esperanto-kongreson en Varna, 20-22.VII.1958. Rekompenco laŭ deziro. Louis Obreczian, Box 51, Waterman, Penna.

Bulgaraj pacbatalantoj, abonu la internacian gazeton

„P A C O“

oficiala organo de **Mondpaca Esperantista Movado**. Aperas ĉiumonate en malsamaj landoj. En ĝi vi legos tre interesajn artikolojn, rakontojn, poemojn, informojn, anoncojn ktp. kaj vi trovos adresojn de la plej progresemaĵoj esperantistoj el la tuta mondo.

Abonkotizo por la jarkolekto 1961 estas 12 levoj

Abonebla ĉe BEA, bul. Dondukov 57, Sofio.

Ne prokrastu!

Tuj abonu!

„BULGARA ESPERANTISTO“

aperanta regule ĉiumonate en 16 paĝoj, ilustrita, en du koloroj, prezentas al la legantoj varian legadon: rakontojn, versaĵojn, humoraĵojn, lingvajn problemojn, Esperanto-novaĵojn el Bulgario kaj la mondo. Ĝi estas nepre necesa por ĉiu Esperanto-aktivulo, ĉar en ĝi CK de BEA publikigas siajn decidojn kaj direktivojn, informas pri la okazaĵoj en nia movado kaj pri ĝia stato.

„BULGARA ESPERANTISTO“

estas la plej ŝatata kaj rekomendinda gazeto por la geesperantistoj en nia lando.

La Redakcio kiel ĉiujare ankaŭ nun faras rabaton al tiuj gesamideanoj, kiuj abonos ĝis la fino de decembro (ĝi validas nur por tutjara abono)

12 levoj

Duonjara abono — 7 levoj

Por eksterlando — 16 levoj

Post 1-a de januaro la jarabono por Bulgario estos 14 lv.

Tuj abonu! Helpu al la redakcio pri plibonigo de la gazeto!

